# *Kuba prezidento plenumas intensan tagordon en la centra provinco Cienfuegos*




**Foto: Díaz-Canel trairas diversajn sociekonomiajn lokojn en Cienfuegos. Foto: PL**

Cienfuegos, jul 25 (RHK) La prezidento de Kubo, Miguel Díaz-Canel, komencis sian turneon en la provinco de Cienfuegos tra la komunumo El Fanguito, unu el la 42 vundeblaj kvartaloj inkluzivitaj en programo de restarigo.

Frumatene, la prezidento notis en sia tvitera profilo: “Ni iras al la bela Cienfuegos. Ni vizitos kvartalojn, produktajn, kulturajn kaj edukajn centrojn. Nian ?uldon ni pagos anka? kun la termoelektra centralo Carlos Manuel de Céspedes. Ni inter?an?os kun tiu batalema urbo kaj ?iam ribelema #Siempre en 26”.

La ?eesto de la anka? unua Sekretario de la Centra Komitato de la Komunista Partio (PCC) okazas sojle de la festado de la 69-a datreveno de la sturmoj kontra? la kazerno Moncada kaj Carlos Manuel de Céspedes, kiuj la 26-an de julio 1953 markis la komencon de la Kuba Revolucio.

La prezidenton akompanas la ?efministro, Manuel Marrero, kaj la Sekretario pri Organizo de la Centra Komitato de la PCC, Roberto Morales, plus la ?efaj teritoriaj a?toritatoj.

?irka? 10.000 provincanoj partoprenos morga?, mardon, en la centra solena?o okaze de la Nacia Ribelo-Tago.

La 26-an de julio 1953, grupo de junuloj gvidataj de Fidel Castro, kaj poste identigitaj en la kuba historio kiel la Centjara Generacio, atakis la kazernon Moncada (Santiago de Kubo) kaj Carlos Manuel de Céspedes (Bayamo), agojn kiujn Fidel mem priskribis kiel la malgranda motoro kiu startis la grandan motoron de la Revolucio.

Fonto: PL

---

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/nacionales/294528-kuba-prezidento-plenumas-intensan-tagordon-en-la-centra-provinco-cienfuegos

Radio Habana Cuba